



# LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Graftdijk (NH), Nederlando  
Ĝironumero 382363 Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

## Karaj Geamikoj,

Dum nia 7-a I.J.K. en Haarlem preskaŭ la tuta estraro ŝanĝiĝis kaj por la unua fojo en la historio de T.J.O. ĝi nun plene konsistas el junaj homoj.

Tio signifas, ke T.J.O. eniris novan epokon, en kiu devos montriĝi, ĉu nia organizo estas sufiĉe matura, ke ĉiuj taskoj laŭbezone povas esti plenumataj de la junularo mem.

La nova estraro estas plena de fido, sed ..... kompreneble ĝi bezonas la firman kunlaboron de ĉiuj anoj kaj precipe de la ĉefperantoj kaj perantoj.

Oni bone konsciu, ke bona funkciado de iu unuigo aŭ klubo dependas ne nur de la agadoj de la estraro. sed ĉefe de tiuj de la tuta anaro mem.

Ni ĉiuj scias, ke „La Juna Vivo” estas unu el niaj plej gravaj kontaktiloj kaj propagandiloj. Ofte la gazeto estas rigardata kiel la animo de la organizo. Se ĝia nivelo estas malalta, ĝi malbone efikas je nia propagando. Tial nia organo elspiru la veran esencon, kiu ĉiujn anojn ligas kaj trovas sian kulminon dum niaj ĉiujaraj internaciaj renkontiĝoj. Pro moncirkonstancoj LJV nun eliras 8-paĝa, sed ni pripensu, ke tiuj 8 paĝoj ĉiuj apartenas al ni mem. Ni do ankaŭ mem plenigu ilin!!!

Grave estas, ke la nombro da TJO-anoj kiel eble baldaŭ pligrandiĝu, por ke i.a. nia gazeto ree povu ekhavi sian antaŭan amplekson de 16 paĝoj.

Dum la aŭtuno ni do propagandu T.J.O.-on; ne nur en esperantaj rondoj! Faru prelegojn pri Esperanto kaj ĝia utilo en junularaj organizoj, lernejoj, kluboj, k.t.p. Aranĝu se eble propagandvesperojn kaj formu studgrupetojn. Instruu mem, aŭ, se vi ne kapablas, serĉu spertan Esperanto-instruiston. La estraro estas ĉiam preta helpi vin ĉiurilate.

Se vi sukcesas aranĝi ion, kontaktu kun via ĉefperanto.

Ne forgesu pagi vian kotizon sufiĉe frue, ĉu al La TJO-Centro, ĉu al via ĉesperanto, alie vi embarasos nian novan kasiston, kiu mem faros sian eblon irigi ĉiun monaferon kiom eble plej glate.

Finfine ni volas esprimi al ĉiuj geeksfunkciuloj nian koran dankon pro la multa laboro, kiun ili faris en la pasintaj jaroj.

Tammo Kanter (prezidanto).

## JUNULO REMEMORAS.

Kiel do iam diris la anglo Thomas Moore en unu el siaj ĉarmaj poemoj?

„..... pasinteco ja estas plej bona!”

Kaj se vi dum vespero sidas ĉe la fenestro kaj rigardas eksteren al la pluvado, tiam kaptas vin sopiro al tiuj belaj tagoj de la pasinteco kaj vi estas iomete malĝoja.

Tiam denove aperas antaŭ viaj okuloj la neĝkovritaj montegoj kaj la verdaj valoj, super kiuj briladis la suno. Denove vi vidas la densajn, malhelajn arbarojn kaj la arĝente radiantan akvon de la granda rivero, kies ondojn vi sekvis dum multaj tagoj. Refoje vi aŭdas la bruadon de la maro ĉe la bordo kaj ĝi ŝajnas al vi dolĉa muziko. Vi pensas pri la grandaj urboj, kies larĝajn stratojn vi iam trairis kaj viaj okuloj denove ekbrilas, kiam vi rememoras la vesperon, per kiu finiĝis la tago, kiu eble estis unu el la plej feliĉaj en via vivo .....

Estis printempa vespero. La suno jam malleviĝis kaj la ĉielo koloriĝis ruĝa. La lago, kies ondoj similis dancantajn diamantojn, kiam la oraj sunradioj ankoraŭ respeguliĝis en ĝi, nun jam ripozas kaj aspektas mistera, kiam via boato mallaŭte trapasas la dolĉe murmurantajn fluojn. Venis la krepusko kaj la steloj ekbrilis unu post la alia sur la firmamento. Ensorĉigite vi ekkantas ravan melodion. Jen jam la bordo kun siaj altaj, muĝantaj arboj. Sopire vi ankoraŭ unu fojon rerigardas al la soleca insulo, kiu nun kuŝas malhela kaj kiel fantomojn vi vidas la turojn de la kastelo en la lumo de la luno. Sed en la malproksimo jam ekbrilis la miloj da lumoj de la grandurbo kaj vin allogas la multkolora brulado de la grandaj avenuoj.

Denove bela tago finiĝis, tago, kiu neniam revenos, sed kiu restos en via memoro, kio ajn okazu .....

Pedro (Germanujo).

(Pro la kongresraportoj la daŭrigo de „Ekskurso al la montaro” aperos en la oktobra n-ro.)

Ĉu VI jam aĉetis ion en la Verda Monato? Ĉiu VERA Esperantisto ja faras tion! Atentu, ke la nova adreso de nia libro-servo estas: Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando.

Jaŭdon ni alvenis, triope. Post belega bicikla veturo inter la dunoj, ni finfine vidis la turojn de nia kongresurbo. Facile ni trovis la „Openluchtschool” (subĉiela lernejo), en kiu unu el ni loĝos. Kompreneble ni akompanis lin, scivolantaj kiuj jam ĉeestas. Kaj jen, apenaŭ ni estis en unu el la dormejoj, kiam jam venis tri jugoslavoĵ, inter kiuj la poste tiom „fama” Ali Baba. Ili varme premis al ni la manojn kaj for estis ĉiu fremdeco.

Duonhoron poste ni biciklis al la alia lernejo „Cios” kaj ankaŭ tie ni havis koran bonvenon. Post la pago de la kotizo kaj la pretigo de niaj litoj ni jam interparolis kun gekonatoj kaj nekonatoj, vigle, entuziasme, kun la interna sento ke ni formas unu tuton. Ĉu oni konsciiĝis pri la granda valoro de la lingvo, per kiu oni esprimis sin?

Jen oni aŭdas fragmenton de frazo, nomon: „Ĉu vi estas Kaj Pedersen? Ho, agrable fine interkonatiĝi kun vi!”

Montriĝas la valoro de kunveno: Subite oni vidas personojn, kun kiuj oni eĉ dum jaroj skribe interrilatis kaj pri kiuj oni kelkfoje havis tute alian impreson.

„Cios” situas meze de parko, ĉirkaŭita de dunoj, surkreskitaj de diversspecaj arboj kaj arbustoj, belege! — Malfrue ni enlitiĝis, parolante ankoraŭ dum horoj, intertempe ĝuante la strangajn kriojn de angla knabo, kiu sonĝis kaj en la postaj noktoj eĉ somnabulis!

Vendredon ni aŭtobuse iris al la urbeto Alkmaar, konata pro sia ĉiu-semajna fromaĝfoiro. Pentrinde!

Posttagmeze ni iris al Bergen apud la Norda Maro, kie ni piedbanis kaj ripozis sur la larĝa strando.

Vespere ni ĉiuj kolektiĝis en la parko de „Cios”. Post iom da gramofona muziko nia (eks)prezidanto, s-ro Geurts, malfermis la 7-an I.J.K., bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn, inter kiuj reprezentantojn de diversaj unuiĝoj kaj ĵurnalistoj.

Sabatmatene la Haarlema urbestro oficiale bonvenigis nin en la belega urbdomo. Oni regalis nin per kafo kaj kuko. Antaŭe la diversaj reprezentantoj jam kunvenis en la geedziĝa salono, kie radiatorportisto surrubandigis la diversajn voĉojn, kiuj posttagmeze estis disaŭdigataj pere de la radiostacio Hilversum.

La posttagmezo estis libera kaj vespere okazis kunveno, en kiu parolis s-ino Isbrücker pri Mondfederalismo kaj s-ro Cseh pri sia esperantistiĝo. Tre interesa vespero.

La sekvintan tagon ni ree ekskursis. Pere de aŭtobusoj, tramo, boato kaj denove tramo ni finfine atingis Volendam, unu el la tre pentrindaj loĝlokoj de la Isellagaj fiŝkaptistoj. Intence ni vizitis ĝin dimanĉe, ĉar tiam la volendamanoj portas siajn plej belajn vestaĵojn, irante al la preĝejo kaj pro tio, ke ĉiuj ŝipoj kuŝas en la haveno. De Volendam ni tramis al Edam, kie ni admiris la internaĵon de la tiea malnova protestanta preĝejo.

Vespere oni okazigis en la subĉiela lernejo improvizitan festvesperon.

Lundmatene okazis la jarkunsido, pri kiu estas raporto aliloke en ĉi tiu gazeto, same kiel pri la diskutoj, kiuj okazis posttagmeze.

Vespere ni havis internacian festvesperon bonegan: Kiu ne plu memoras

la prezentadon de Daniel, franco, kun siaj aparato, ŝercoj kaj „sambo”; la kantadon de anglinoj kaj geĝermanoj; la pantomimojn de Ali Baba (ridigaj!) kaj la diversajn teatraĵetojn?

Sufiĉe malfrue ni iris al „Cios”. La alilerneranoj ankoraŭ aranĝis balon sur placo en la proksimeco, kiun ĉeestis multaj Harlemano.

Mardon posttagmeze ni vizitis la preĝejon „Sankta Bavo”, malnova konstruaĵo kun orgeno de 3 mil tuboj.

Vespere ni ĝuis la programerojn, por kiuj ne estis tempo en la antaŭa vespero. La filmoj de la Jugoslavo bedaŭrinde ne povis esti prezentataj pro netaŭga aparato. Sub la gvidado de s-ro Tordoff ni ankoraŭ popoldancis, post kio ni en torenta pluvego rapidis hejmen.

La lastan tagon ni pasigis en Amsterdamo, kie ni havis belegan boatveturon en la kanaloj kaj havenoj. Poste ni estis liberaj kaj multaj uzis la okazon por vagi en la urbo. Mi mem iris kun kelkaj samideanoj al la Ŝtata Muzeo, kie ni admiris la „Nachtwacht”, la plej konatan pentraĵon de la fama Rembrandt.

Vespere ni kolektiĝis denove en Cios, kie ni ĝuis varian programon, dum aliaj intime „gearbarumadis” en la vastaj ĉirkaŭaĵoj, por tiamaniere adiaŭi.

Ĵaŭdon la plej multaj forveturis, aliaj restis ĝis sabato por partopreni en la postkunveno en Hollandsche Rading. Kaj ni ... ankaŭ ni devis adiaŭi. Ni surbicikligis nin, svingis la manon kaj ... pasinta estis ĉi tiu semajno, en kiu ni pleniĝis de multaj impresoj kaj nova entuziasmo.

Ĝeamikoj, ĝis la venonta jaro en Danlando.

T. K.

### Oni flustras en intimaj rondoj pri la I.J.K.

... ke la Bremenanoj, kiuj estis en Haarlem, anstataŭ iri al la „Subĉiela Lernejo” post longa serĉado finfine troviĝis en la „Subĉiela Teatro”.

... ke la kuiristo de „Cios”-sportlernejo lernigis al nederlanda „Finnlandano” la nederlandan lingvon.

... ke li supozis, ke tiu persono estas eksterlandano.

... ke la nova kasisto dum la I.J.K. oficiale edziĝis en la urbdomo.

... ke li post kelkaj tagoj petis eksedzigon pro la loĝeja problemo.

... ke Ali Baba estis kisinta samideaninon tiamaniere, ke li la sekvintan matenon ekstaris kun ege doloraj lipoj!

... ke li diris, ke „tio estas kutimo en sia lando.”

... ke la nomita persono pro siaj pantomimoj ricevis leteron de filmkompanio por partopreni en la nova filmo: „Virino ellitiĝas”.

... ke oni ekvidis nederlandanon kun la perdita ĉapo de s-ro Williams sur la kapo.

... ke la nova asesoro Kurt Meyer (Germ.) dum tuta la jaro ne estos en sia lando.

... ke li timas tro da estrara laboro kaj do pro tio agas tiamaniere.

\*\*

### Pri la postkunveno en „De Rading” oni flustras

... ke ĝenerale ĝi bone sukcesis, kvankam oni tro ofte aŭdis la anglan kaj nederlandan lingvojn.

... ke s-roj Toms, Tordoff kaj Allan Libby estas tre spertaj lavistoj.  
... ke kelkaj anoj iun vesperon en tre stranga maniero fiŝkaptis per la buŝo.  
... ke Anneliese ĉiam diris: „Ah so!” .....

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuizen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.*)

**Germanujo.** Ĉar Günther Schaedel ne plu povas plenumi sian taskon de ĉefperanto, Michel Schmidt anstataŭos lin. Do bone atentu la novan adreson: **M. Schmidt, Grüngang 2, Konstanz a. B.**

Elkore ni dankas s-ron Schaedel, pro ĉio kion li faris en la intereso de nia movado.

**Protokolo** de la ĝenerala membrokunsido de TJO okazinta en Haarlem la 30-an de julio 1951-a.

La prezidanto, s-ro C. Geurts, malfermas la kunsidon je la 10-a h. kaj bonvenigas la TJO-anojn. Li esprimas sian kontentecon pri la nombro da ĉeestantoj, pli granda ol kutime. Post voĉlego de kelkaj tro malfrue alvenintaj salutleteroj oni transiras al la 1-a punkto de la tagordo: la financa jarraporto.

Kurt Meyer (Germ.) demandas, el kio konsistas la „diversaĵoj” ĉe la enspezoj. F-ino Kool respondas ke plejparte donacoj formas tiun sumon.

S-ro Tordoff proponas akcepti la raporton.

Kaj Pedersen ne volas akcepti la budĝeton, kiu laŭ li estas tro favora. Pro la nova eldonmaniero de „LJV” estas tre malfacile juĝi pri la budĝeto. La plimulto deziras akcepti ĝin; do akceptata.

La sekretaria jarraporto estas akceptata sen voĉdono.

Pri proponoj senditaj de la Regiona Ligo Baden: Ŝanĝi la nomon de TJO en TEJ (Tutmonda Esperanto-Junularo). Defendas la proponon f-ino Waldowski. Ŝi argumentas, ke nuntempe en Orient-Germanujo ekzistas politika junular-movado, kiu portas la saman nomon en la germana lingvo. Tio povus kaŭzi miskomprenon pri „nia” TJO. Tre multaj personoj forte deziras konservi la nomon TJO, rezonante, ke TJO estas vivanta ideo ĉe la esperantistaro, ke TJO ne povas kaŭzi miskomprenon, ĉar ĝia nomo estas konata nur en Esperanto kaj ne tradukita. Post voĉdono: 3 por TEJ, la ceteraj por TJO, oni akceptas konservi la nomon „Tutmonda Junular-Organizo”.

Pri Celo kaj Rimedoj: La ĉeestantaro unuanime opinias, ke la ĝisnunaj paragrafoj pri tio en la TJO-regularo enhavas ĉion necesan kaj pro tio ne akceptas la proponitajn ŝanĝojn. La nova estraro faros novan regularon kaj serioze pristudos la ceterajn proponojn de la Regiona Ligo Baden.

Propono de la estraro ŝanĝi jam nun la regularon jene: 1) La estraro konsistas el: prezidanto, sekretario, kasisto kaj du asesoroj. Akceptata. 2) La administra jaro daŭras de la 1-a de sept. ĝis la 31-a de aŭgusto. Post klarigo de f-ino Kool, ke tio estas pli bona por la administrado, la propono estas akceptata. 3) La kotizo, kiu inkluzivas abonon al „La Juna Vivo” estas 3 guld. jare. Akceptata.

Estrarsanĝo. Eksiĝas s-ro Geurts (prez.), s-ro Timmerman (kasisto), Aris Blauw, Piet Slagt kaj Elly Beekman, asesoroj. La estraro mem ne havas

kandidatojn; ĝi preferas, ke la anoj mem elektu siajn estontajn gvidantojn. Por la funkcio de prezidanto oni proponas Tammo Kanter (Ned.) kaj Kaj Pedersen kandidatigas Michel Schmidt (Germ.).

S-ro Muusses por la ĉeestantaro esprimis nesimpatian al kondiĉoj de Michel Schmidt, ligitaj kun la prezidanteco, sed retiritaj antaŭ la I.J.K. Post kiam Tammo Kanter, laŭ peto de s-ro S. S. de Jong Dzn., rakontis iom pri sia laboro en la junulargrupo „Ekstazo”, kies prezidanto li estas, Kaj Pedersen retiras sian kandidatigon de Michel Schmidt, ankaŭ ĉar pluraj opinias, ke almenaŭ la estraranoj, kiuj havas specialan funkcion, loĝu en unu lando.

La kunveno kandidatigas Geert de Vries (Ned.) kiel kasiston. Akceptata. Por havi pli firman kontakton ankaŭ en aliaj landoj estas elektataj kiel asesoroj Kurt Meyer el Bremen kaj Michel Duc Goninaz el Parizo.

Post la elekto de la nova estraro, la sekretario esprimas en la nomo de la antaŭa estraro tre koran dankon al s-ro Geurts, kiu faris por TJO tion da laboro, ankaŭ organizante la kunvenon en Haarlem.

Pri la proponoj de s-ro v. Veenendaal: S-ro Geurts proponas, ke la nova estraro pristudu ilin en la venonta jaro. Akceptata.

Kongreso en 1952-a. Laŭ peto de la estraro Kaj Pedersen, la dana ĉefperanto, komencis en tiu ĉi jaro esplori la eblojn organizi la 8-an IJK en Danujo. Danujo havos kiel kongreslando plurajn avantaĝojn. I.a. ĝi troviĝas sur la vojo al Oslo, la urbo de la U.K. en 1952-a. La ĉefperanto raportas, ke ankoraŭ ne ĉiuj permesoj estas akiritaj, sed li opinias la 8-an IJK en Danujo ebla. Li restos en vigla kontakto kun la estraro, por kiom eble plej baldaŭ doni definitivon komunikon.

Ronddemando. Pluraj personoj plendas, ke multaj kongresanoj ankoraŭ ĉiam ŝatas „krokodili” kaj tial ili petas, ke la kongresorganizantoj antaŭe informu pri la lingvoscio de la aliĝintoj. Dum la diskutado montriĝas, ke tiu propono, kvankam bona, ne estas efektivebla. Aliflanke oni ne forprenu de komencantoj la okazon spertiĝi en la kunveno. La ĉefa respondeco pri la Esperanto-parolado kuŝas ĉe la gvidantoj, instruistoj, kiuj bone konsideru, ĉu iliaj gelnantoj havas almenaŭ elementan scion de Esperanto.

La propono en venontaj kongresoj organizi unuhoran lecionon ĉiutage estos konsiderata de estontaj Organizaj Komitatoj.

Envenis propono de la maroka ĉefperanto, s-ro Ohana, ke la TJO-estraro klopodu penetri la ĉefojn de la internacia skolta movado por rekomendi la uzadon de Esperanto. La sekretario respondas, ke la plej taŭga instanco por tion fari estas la Skolta Esperantista Ligo kaj ke TJO kompreneble volonte donos ĉiun kunlaboron en tiu afero.

S-ro Geurts dankas la anojn pro iliaj ĉesto kaj kunlaboro kaj fermas la kunsidon.

Delft, la 17-an de aŭgusto 1951-a.

La sekretario.

**Diskutoj.** Sub prezido de Tammo Kanter.

La diskutoj temas pri la enhavo de „La Juna Vivo”. De pluraj flankoj ni ricevis valorajn rimarkojn.

Forta deziro estas, ke aperu almenaŭ unu kanto kun muziknotoj en ĉiu numero. Ĉar la presado de notoj estas tre multekosta, ni uzos anstataŭ tiujn,

ciferan aŭ literan sistemon. Laŭ spertuloj en la rondo tiuj sistemoj estas tre facile lerneblaj por ĉiu, kiu iom scias pri muzikteorio.

Kurt Meyer opinias, ke LJV enhavu pli da artikoloj kia ekzemple „La Junuloj antaŭ la Vivo”. La plimulto samopinias pri tio kaj kompreneble la redaktorino, f-ino Kool, tuj petas la ĉeestantojn verki amase! Efektive kelkaj promesas fari sian eblon. (Ni ankoraŭ atendas. Red. LJV).

Kelkaj sugestas, ke la poŝtmarkrubriko prefere enhavu artikoletojn pri filatelio kaj ne komunikojn pri ricevitaj kaj senditaj poŝtmarkoj.

Kelkaj proponas forigi la skoltan rubrikon, ĉar la geskoltoj jam havas propran organon. Ĉar la redakcio ne sufiĉe scias la interesigon de la legantaro por tiu ĉi rubriko, ĝi informiĝos pri tio en pli vasta rondo, antaŭ ol fari decidon.

F-ino Kool sciigas, ke ne plu eblos enpresigi fotografiaĵojn, ĉar la preskostoj estas tro altaj. Nur linikliŝoj aperos de temp' al tempo.

Sekvas interparolado pri la programo de la 8-a IJK en Danujo. Oni donas plurajn konsilojn al la dana ĉefperanto. Provizore estas planitaj interkonatiga vespero, granda ŝipekskurso, popoldancado kaj ĉiukaze balo. Kompreneble la plej multaj ekskursoj kaj aranĝoj dependos de la elektota kongresurbo.

La kunveno spontanee proponas fari s-ron Geurts honora membro de TJO, kio estas akceptata de ĉiuj kun granda entuziasmo.

S-ro de Jong, estro de Radio-Servo NCKE, petas ankoraŭ atenton por la Esperanto-radio-elsendoj kaj speciale atentigas pri la elsendoj de Radio Roma. Li konsilas, ke ankaŭ la TJO-anoj regule skribu al tiu stacio. S-ro Veldhuyzen petas la samon por la Svisa Radio.

**Filmstrio.** Por kompili filmstrion, montrotan en la venonta IJK, ni petas ĉies kunlaboron. Sendu viajn fotografiaĵojn al la sekretario.

**Fotoj I.J.K.:** Kiu ne jam ricevis la oficiala(j)n foto(j)n kiu(j)n li (ŝi) mendis, havu iom da pacienco. Tuj kiam ni ricevos ilin, ni sendos via(j)n ekzemplero(j)n. Libro-Servo, Delft.

La adresoj de la novaj estraranoj: Prezidanto: Tammo Kanter, Lombokstr. 2, Leeuwarden (Ned.) — Kasisto: Geert de Vries, Spoorstr. 24, Leeuwarden (Ned.). — Asesoroj: Michel Duc Goninaz, 12 Place de la République, Paris X (Francujo) kaj Kurt Meyer, Parkstrasse 99, Bremen (Germ.).

## SKOLTA RUBRIKO.



**Pligrandiĝo.** Dum la jaro 1950-a la nombro da gestroj kaj geskoltoj pligrandiĝis. La pligrandiĝoj estas:

Skoltestroj: 65.383; skoltestrinoj: 100.056; Roverskoltoj: 14.960; skoltoj: 236.632; maristaj skoltoj: 14.884; lupidoj: 422.222.

**Propagando:** Dum la jaroj 1950-a kaj 1951-a la gazeto de la sendependaj neŭtralaj geskoltoj ĉiumonate publikigis rubrikon kun informoj ricevitaj dank' al Esperanto. Imitinda propaganda laboro!

**La Skolta rubriko en LJV.** La redakcio volonte sciuz, kiom da intereso ekzistas por ĉi tiu rubriko. La spaco en nia organo ja estas tre limigita, do se por la skoltaj komunikoj montriĝos ne sufiĉe da intereso, ni ĉesigos la publikigadon. Geamikoj, dependos de vi, ĉu la skolta rubriko restos aŭ ne. Bonvolu skribi vian opinion al Red. „La Juna Vivo”, TJO-Centro, West-Graafthijk, Nederlando.

Sajne ne ĉiuj bone legis nian komunikon en la antaŭa n-ro. De nun la kotizo estas 3.—guld. jare. Tiuj, kies abono finiĝis je la 1-a de julio, do pagu 3.— guld. plus 0,25 guld. por la julio/aŭg.-n-ro, ĉar la administra jaro nun ja iras de septembro-sept. — Kiu jam pagis ĝis 1/1'52 (aŭ ĝis 1/7'52), multe helpos, se li (ŝi) alpagas la pli altan kotizon.

## KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Bulgarujo:** Argir Nikolov Argirov, str. Plovdivska 2, Asenovgrad, dez. kor. kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj.

17-j. studento, Dinko K. Pavlov, str. Samuil 61, Burgas, dez. kor. kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj gazetojn.

Mi dez. kor., prefere kun nederlandoj, pri sporto k.t.p. Interŝ. poŝtk., gazetojn, fotojn. Georgi Valkov, Str. Ivaljo 6 P, Burgas.

**Ĉeĥoslovakujo:** Kiu sendas maldekstre stampitan respondkuponon aŭ iom da propagandmaterialo (gazetojn, poŝtk. ktp.) ricevos 5 adresojn diverslandajn laŭ sia peto. Skribu al Jan Neumann, Chodovec 377, Praha.

Radoslov Dohmal, Vojice 79, p. Ujezd Podhorni, dez. kor. k. nederlandano.

**Ĉinujo:** 11 junaj geesperantistoj dez. kor. kun alilandaj geesperantistoj. Skribu al: Ŝanhaja Esperantista Ligo, P. O. kesto n-ro 636, Ŝanhajo.

**Danujo:** Dez. interŝ. infandeseĝnaĵojn Roma Thorsen, instruistino, Vibenshus skole, Strandboulev 147, Kopenhago Q.

**Japanujo:** 3 studentoj, 18-j., dez. kor.: Chikahiro Saito, 31.4, Okada-Gomu-Shataku, Futamata-Cho, Iwata-Gun, Shizuoka-ken; Takahiro Ito, 44 Teras-hima-Cho, Hamamatsu-Shi, Shizuoka-ken; Yoshihiko Atsumi, 1368 Kamijima, Nakaze-Mura, Hamana-Gun, Shizuoka-Ken.

3 gimnazianoj, 16-17-j. dez. kor. Skribu al Satou Ŝigeru, 1-5 Tomisaka, Bunkjo-ku, Tokio.

Kusumi Joŝitaro, 5-1, 111 Sugamo, Tosimaku, Tokio, (gimnaziano), dez. kor. per leteroj aŭ il. poŝtk.

Jus aperis:

**Esperanto Leerboekje** voor de lagere school en voor hen, die geen ander dan lager onderwijs genoten. 1ste deeltje door H. A. Appel, Bergen op Zoom. Pr. f 1,50. Mendu ĉe la TJO-Libro-servo, Hof v. Delftlaan 79, Delft.

**Vintro-tempo, studo-tempo.**

Mendu jam nun la lernolibrojn por via kurso!

Bonegan lego-materialon vi trovas en la M.E.B.-libretoj, prezo po 0,35 guld.

Propagandu per la **TJO-Poŝtpapero** 50 folioj + 50 kovertoj por 2.— guld.